



NEDERLANDA ESPERANTISTO

*Monata Organo de la Nederlanda Esperanto-Asocio
"La Estonto Estas Nia"*

30-jara; n-ro 4-a. Administranto: P. M. Mabesoone, Cort van der Lindenlaan 42, Harderwijk. Jara abono por ne-membroj: gld. 4,50. Por membroj senpaga.

Redaktoro: H. Groendijk, Pontanuslaan 7, Arnhem. Tel.: 0 83 00 - 2 66 99.

ASOCIA JARRAPORTO 1964

Estimataj L.E.E.N.-membroj,

La jaro 1964, precipe ĝia dua parto, alportis al ni, esperantistoj, du gravajn aferojn. En la komenco de aŭgusto okazis en Den Haag la 49-a Universala Kongreso de Esperanto. Unu monaton poste, precize je la 5-a de septembro fondiĝis la „Federacia de Esperanto-Organizoj en Nederlando” („F.E.N.”).

La unua okazintajo restos en la memoro de la partoprenintoj kiel sukcesplena, interesa kaj neforgesebla semajno. Kelkajn neeviteblajn malfacilaĵojn kaj erarojn en la organizado de impona kongreso (pli ol 2000 personoj partoprenis) ni jam forgesis.

La ĉefestraro de L.E.E.N. konscias, ke la anoj de la Loka Kongresa Komitato dum longa tempo „tage kaj nokte” laboregis por doni al la gastoj ĉi tiun agrablan semajnon. Pro tio la tuta ĉefestraro en tiu ĉi jarraporto sendas siajn plej korajn dankesprimojn al la nelaciĝintaj membroj de la Loka Kongresa Komitato.

La 49-a Universala Kongreso fariĝis pasinteco!

Feliĉe ankoraŭ ne la en septembro stariĝita F.E.N.! Je 5-9-'64 ni nomis kiel reprezentantojn de L.E.E.N. en ĉi tiu Federacio: s-inon E. Kervers-van Tholen, s-inon H. J. Woessink-Boet, s-ron d-don J. P. Lok (li fariĝis ĝia kasisto) kaj s-ron mag. F. Winkel (li fariĝis ĝia prezidanto). En la fino de la jaro s-ino Kervers sciigis

al la ĉefestraro, ke ŝi pro privataj kaŭzoj ne plu povos plenumi la funkcion. Ni do devis serĉi alian reprezentanton.

Post peto de la administra estraro f-ino Vermaas montris sin preta fariĝi nia 4-a reprezentanto.

Fine de 1964 la kernestraro de la F.E.N. prezentis al ni aron da efektivigindaj proponoj. Ni ĝojas, ke la nova F.E.N. povas disponigi pri pli da monaj rimedoj ol la antaŭa N.C.K.E.

Kun intereso ni atendas ĝian disvolviĝon, dezirante al ĝi plenajn laborforton kaj sukceson!

Pri la okazintajoj en nia propra asocio mi povas doni al vi jenajn informojn.

En la komenco de la jaro f-ino Benink, Almelo, transdonis al L.E.E.N. la eldonrajtojn de la de ŝi verkitaj lernolibroj.

Ni daŭrigis la propagandon por Esperanto per menukartoj kaj anoncioj en la internaciaj vagonaroj, kun ia helpo de la iniciatinto, s-ro Hans Bakker (patro) en Amsterdam.

Nia hinda samideano s-ro Aŝvinikumar, nun loĝanta kaj laboranta en Amsterdam, en 1964 prelegis pri sia patrolando por 6 L.E.E.N.-sekcioj. En 1965 li daŭrigos la tre interesajn prelegojn por aliaj sekcioj. Ni decidis subteni per mona subvencio el la Mabesoone-fondaĵo la agadojn de la Esperanto-Rondo en la Universitato de Amsterdam.

Nia reprezentanto en la „Nederlands Ge-

nootschap van Vertalers" fariĝis mag. S. Pragano.

En la jarraporto 1963 de la Unuiĝo „Nederland in den vreemde”, kies membro L.E.E.N. estas, ni legis: „Het op verzoek en voor rekening van de Rijks-Voorlichtings-Dienst te 's-Gravenhage in het Esperanto vertaalde vouwblad „Nederland” is in april 1963 verschenen en door het Departement van Buitenlandse Zaken in samenwerking met het Internationaal Esperanto-Instituut te 's-Gravenhage onder Esperantisten in verschillende landen verspreid”.

En 1964 la ĉefestraro denove sendis librokuponon al la sukcesintoj por la ekzameno, kiuj estas membroj de L.E.E.N. Denove ni donacis respektive por la S., M.- kaj E.-ekzamenoj gld. 10,—, 5,— kaj 2,50. Multaj ricevintoj entuziasme dankis la ĉefestraron.

Ni daŭrigis la vizitadon al la sekcioj. Nia intenco estis, ke ĉiu L.E.E.N.-sekcio dum la vintra sezono unufoje ricevu viziton de ĉefestrarano. Ni faris nian eblon efektiviĝi ĉi tiun planon, tamen pro tempomanko la bonaj intencoj ne ĉiam plene realiĝis.

L.E.E.N. fariĝis membro de la dum la U.K. en Den Haag fondita „Internacia Asocio de la Esperantaj Eldonistoj”. Ni dankas nian membron, s-ron DeGoeij, Rotterdam, kiu montris sin preta en la nomo de L.E.E.N. organizi komunan vojaĝon al la Eŭropa Esperanto-Konferenco (julio 1965 en Vieno).

Nian jarkunvenon, kiu okazis 24-5-'64 en Utrecht, vizitis sufiĉe granda aro da membroj kaj sekciaj delegitoj. La salono estis plenplena. Kompreneble la ĉefestraro ĝojas pro ĉi tiu kreskanta interesiĝo flanke de la membroj. En 1964 ĉeestis proksimume 80 personoj, en 1963 nur 35. En junio 1964 s-ino Woessink sukcesplene prelegis pri Esperanto kaj pri L.E.E.N. en kunveno de la „Nationale Vrouwenraad van Nederland”. (Ekde julio 1963 nia asocio estas membro de tiu ĉi Unuiĝo).

Ekde 5-7-'64 s-ro T. Boersma, Leeuwarden, funkcias kiel prizorganto de la Libro-Servo L.E.E.N. La ĉefestraro sendis dankesprimojn kaj donackuponon al s-ino Mabesoone, kiu tiom longe kaj aku-

rate prizorgis nian Libro-Servon.

La biblioteko de L.E.E.N. en septembro 1964 transloĝiĝis al la Universala Biblioteko en Amsterdam. En oktobro s-ro Janssen komencis ordigi kaj listigi la librojn. Post kiam ĉi tiu laboro estos finita, la U.B. presigos novan katalogon. La ĉefestraro sendis dankleteron kaj donackuponon al s-ro Koot, Utrecht, kiu ekde 1936 estis nia bibliotekisto.

En 1964 la plena ĉefestraro kunvenis 4-foje, la administra estraro 8-foje. Dum tiu ĉi jaro la sekretariino ricevis 856 poŝtaĵojn (460 leterojn kaj 396 presajojn). La sekretariejo forsendis 906 poŝtaĵojn (567 leterojn kaj 339 presajojn) kaj telefonis pri la asocio 138-foje.

Dum la tuta jaro 1964 la ĉefestraro konsistis el: s-ro H. M. Schippers (prez.), s-ino W. P. Lok-van Putten (sekr.), f-ino P. Oosthoek (kas.), s-ro H. Groendijk (redaktoro), f-ino M. H. Vermaas, s-ro J. R. Janssen, s-ino H. J. Woessink-Boet, s-ro T. Boersma kaj s-ro R. Slot.

La 3 en la jarkunveno laŭvice eksciĝintaj estraranoj (f-ino Oosthoek, s-roj Boersma kaj Janssen) ĉiuj reelektiĝis.

Je 1-1-'65 la sekcioj Bergen (N.H.) kaj Bergen op Zoom ĉesis ekzisti.

Pro tio la nombro de la sekcioj fariĝis 22. Malgraŭ tio mi kun plezuro povas sciigi al vi, ke nia asocio kreskis laŭ membronombro. Ni kreskis, kvankam la kreskado ankoraŭ ne estis tiom ĝojkriinda. La rezulto de la laboro de la sekcioj estas, ke ni havas je 1-1-'65 19 sekciajn membrojn pli ol ni havis je 1-1-'64.

Ĉar ni perdis 3 ĝeneralajn membrojn, la tuta gajno sumiĝas 16 membroj.

Je 1-1-'65 nia asocio nombris 871 membrojn (855), nome 784 (765) sekcianojn kaj 87 (90) ĝeneralajn membrojn. Je tiu dato ĝi havis 265 (269) donacantojn kaj 69 (61) abonantojn. Inter krampoj estas la ciferoj de 1-1-'64.

En la jaro 1964 98 novaj membroj aliĝis, tamen ni perdis 82 membrojn (inter kiuj 13 pro la morto), do restas gajno de 16 membroj.

En mia pasintjara jarraporto mi speciale laŭdis la sekcion Zeist, kiu en la jaro 1963 multe kreskis. Por la jaro 1964 mi volas doni ĉi tiun laŭdon al nia sekcio Den Haag, kiu en tiu ĉi jaro donis al ni

23 novajn membrojn. Ĉi tiu sekcio kun pli ol 100 membroj estas la plej granda L.E.E.N.-sekcio.

Tamen ankaŭ kelkaj aliaj multe kreskis, pro gazetkurso aŭ pro alia aktiveco. En ĉi tiu senco mi volas nomi la sekciojn Almelo kaj Groningen.

Nia organo „Nederlanda Esperantisto” denove enhavis 112 paĝojn kaj aperis 11-foje. Ankaŭ en 1964 s-ro S. S. de Jong korektis la presotaĵojn kaj presprovaĵojn, pro kiu laboro la ĉefestraro kore dankas lin. Koran dankon ankaŭ al s-ro Groendijk, la redaktoro, kaj al tiuj, kiuj sendis artikolojn kaj informojn.

Niaj komitatoj en la U.E.A.-komitato restis s-ino E. Kervers-van Tholen kaj s-ro E. J. Woessink. Ili ĉeestis la 49-an Universalan Kongreson kaj raportos pri ĝi.

S-ino Woessink estis la prizorgantino de la Informa Fako kaj faris la laborojn por la informado al U.E.A.

Nia reprezentanto ĉe la Institucio „Esperanto ĉe la Instruado” restis s-ro Janssen. Pri la agadoj de la sekcioj mi povas sciigi al vi, ke diversaj sekcioj organizis kursojn por komencantoj kaj progresintoj, entute 27 kursojn kun proksimume 210 partoprenantoj.

Gazetkursojn organizis niaj sekcioj Almelo, Arnhem (Arnhemse Koerier), 's-Gravenhage (De Posthoorn), Groningen (Gezinsbode), Leiden (De Leidse Post) kaj Zeist (Nieuwe Zeister Courant).

Per ĉi tiuj 6 gazetkursoj entute proksimume 600 personoj eksstudis nian lingvon. Certe malpli da kursanoj atingos la finon. Tamen la ĉiusemajna aperado de la lecionoj en la diversaj gazetoj estas bona propagando.

S-ro Pragano gvidas kurson por instruistoj en la „Gemeentelijke Kweekschool” en Amsterdam. F-ino Hovinga instruas Esperanton kiel fakultativan fakon en la Seminario en Groningen.

Al ĉiuj kursgvidantoj koran dankon!

En oktobro 1964 okazis en Amsterdam komuna kunveno de la esperantistoj kun la mondfederalistoj, okaze de la Tago de la Unuiĝintaj Nacioj.

Laŭ invito de la „Anne Frank-Stichting” la amsterdamaĵ esperantistoj ĉeestis en decembro prelegon de d-do H. van Praag pri „De Mens Zamenhof”. Ambaŭfoje iniciatis la neesperantistaj unuiĝoj.

Okaze de la 20-a Internacia Junulara Esp.-Kongreso en la Anne Frank-Domo en Amsterdam, T.E.J.O. aranĝis ekspozi-

cion en la tiea Publika Legejo.

Nia sekcio Haarlem ĝemeligiĝis kun la Esperanto-kluboj en Angers (Francujo) kaj Bridlington (Anglujo).

En Krommenie okazis la 12-a Internacia Ferio-Semajno.

Grava aktiveco en Leeuwarden estis la postkongreso, kiu bone sukcesis.

Bedaŭrinde la klopodoj eluzi la propagandan flankon por organizi gazet- kaj aliajn kursojn fiaskis. En kunlaboro kun la „Fryske Akademy” nia sekcio Leeuwarden eldonis „Frisaj Rakontoj en Esperanto”. Envenis multaj reagoj el diversaj landoj ĉe la „Fryske Akademy”, kiu instituto pro tio favoras Esperanton.

Ges-roj Slot (antaŭe ges-roj Van Wijnen) gvidas apartan grupon de gejunuloj en Zeist.

Je 27-8-1905 niaj aktivaj antaŭuloj fondis L.E.E.N. Tiam ĝia plena nomo estis „Holanda Societo Esperantista La Estonto Estas Nia”.

Poste oni anstataŭis vorton „Holanda” per „Nederlanda”. Ĝia unua prezidanto estis la konata s-ro Dreves Uitterdijk.

Dankante lin pro lia laboro kaj dankante ankaŭ tiujn multajn gesamideanojn, kiuj sekvis lin, ni en 1965 festos nian 60-jaran ekzistadon. Esperu ni, ke amaso da membroj ĉestu la Jubilean Kongreson, kiu okazos en Amersfoort de la 24-a ĝis la 26-a de septembro 1965.

La jaron 1965-an la Unuiĝintaj Nacioj nomis „Jaro de Internacia Kunlaboro”. 16 L.E.E.N.-sekcioj sendis en oktobro 1964 al la sekretariato de la U.N. en New York leteron, en kiu ili promesas plenan helpon por sukcesigi ĝin. Kosciante, ke tiu ĉi kunlaboro neniam povos plene efektiviĝi sen komuna neŭtrala lingvo, esperantistoj en la tuta mondo estas kolektantaj subskribojn por la pet-skrubo al la U.N. Laŭ informoj de la prezidanto de U.E.A. la kolektado de individuaj subskriboj bedaŭrinde ankoraŭ ne kontentige progresas.

Ĉu vere 1965 fariĝos „Jaro de la Internacia Lingvo Esperanto”?

Tio ĉi dependas ankaŭ de VI!

Plena de fortaj energio kaj bonvolo via ĉefestraro transpasis la sojlon de 1965. Ni ege esperas, ke ĉiuj L.E.E.N.-membroj estos pretaj firme kunlabori kun ni por antaŭenigi nian lingvon en la Jaro de Internacia Kunlaboro.

Anticipe tutkore dankas vin ĉiujn

W. P. Lok-van Putten, sekretariino.

NOVA MEMBRO ESTAS DONACO AL VIA FESTANTA ASOCIO

FINANCA RAPORTO „L.E.E.N.” 1964.

ENSPEZOJ	Buĝeto 1964	Jarkonto 1964	Buĝeto 1965
Kotizoj	g. 5500,—	g. 5468,85	g. 6400,—
Donacantoj	„ 135,—	„ 138,—	„ 130,—
Abonoj	„ 120,—	„ 133,—	„ 160,—
Libro-Servo	„ 250,—	„ 250,—	„ 250,—
Skriba kurso	„ 5,—	„ 10,—	„ —,—
Anoncoj	„ 120,—	„ 170,50	„ 150,—
Rentumo	„ 375,—	„ 430,45	„ 425,—
Profito peranteco U.E.A.	„ 200,—	„ 200,—	„ 200,—
Ekstra Donaco	„ —,—	„ 200,—	„ —,—
Deficito (prenota el la rezervo)	„ 290,—	„ 136,78	„ 450,—
	<u>g. 6995,—</u>	<u>g. 7137,58</u>	<u>g. 8165,—</u>

ELSPEZOJ

Organo	g. 3300,—	g. 3583,83	g. 4000,—
Administra estraro	„ 600,—	„ 568,85	„ 650,—
Kunvenoj ĉefestraro	„ 350,—	„ 495,12	„ 550,—
Repago sekciaj delegitoj	„ 330,—	„ 223,—	„ 384,—
Kontribuo U.E.A.	„ 450,—	„ 427,50	„ 450,—
N.C.K.E.	„ 20,—	„ 21,40	„ —,—
F.E.N.	„ 267,—	„ 256,50	„ 522,—
Biblioteko	„ 50,—	„ —,—	„ —,—
Reprez. Universala Kongreso	„ 300,—	„ 300,—	„ 300,—
Stichting Esp. b/h. Onderwijs	„ 43,—	„ 42,75	„ 45,—
Salono jarkunveno	„ 40,—	„ 32,50	„ 40,—
Distriktkunvenoj kaj estraranoj	„ 180,—	„ 63,—	„ 100,—
Propagando	„ 475,—	„ 491,67	„ 500,—
„De Esperantist”	„ 340,—	„ 362,11	„ 370,—
Diversaĵoj	„ 110,—	„ 129,35	„ 115,—
Amortizo adresilo	„ 140,—	„ 140,—	„ 139,—
	<u>g. 6995,—</u>	<u>g. 7137,58</u>	<u>g. 8165,—</u>

P. Oosthoek, ĝenerala kasistino.

Peranteco U.E.A. 1.1.'64-31.12.'64.

Saldo	g. 730,10	
Maklero de la kotizoj	„ 499,40	
Maklero de la kongreskotizoj	„ 23,05	
	<u>g. 1252,55</u>	
Propagando	g. 585,28	
Kontribuo al „L.E.E.N.”	„ 200,—	
	<u>g. 785,28</u>	
Restas	g. 467,27	

BILANCO 31 DECEMBRO 1964.

Poŝtĝirkonto	g. 1623,13	Kreditoroj	g. 530,03
Kaso	„ —,—	Kotizoj 1965	„ 166,10
Banko	„ 25,32	Abonoj 1965	„ 39,50
Ŝparkonto	„ 6173,06	Propaganda Kaso	„ 2840,62
Obligacioj	„ 4896,—	Kongresa Kaso	„ 881,81
Adresilo	„ 140,—	Fondajo Mabesoone	
Skribmaŝino	„ 1,—	1.1.'64 g. 2797,97	
Rubandoj	„ 1,—	saldo '64 „ 61,20	„ 2859,17
Magnetofon-servo	„ 95,44	Rezervo	
Debitoroj	„ 847,01	1.1.'64 g. 3194,89	
		deficito '64 „ 136,78	„ 3058,11
		U.E.A.	„ 467,27
		Kapitalo	„ 2869,35
	<u>g. 13711,96</u>		<u>g. 13711,96</u>

P. Oosthoek,
ĝen. kasistino.

RAPORTO DE LA KOMITAT- ANOJ DE U.E.A.

de marto 1964-a ĝis fino de februaro
1965-a.

Se komitatano de U.E.A. serioze traktas sian komitatanecon, li devas en la daŭro de la jaro serioze pristudi la al li senditan materialon, ĉar dum la kongresaj kunsidoj li ja devas scii, pri kio temas, por helpi en la laboroj de la plej elstara Esperanto-asocio.

Dum la tempo pri kiu ni raportas, kiel jam en antaŭaj jaroj, s-ro Woessink estis estrarano pri financoj de U.E.A., kiel tia li i.a. faris kelkajn vojaĝojn al Ĝenevo por solvi la problemojn tie.

S-ino Kervers kune kun s-ro Maertens el Belgujo kontrolis la spezkontojn pri la jaro 1963-a kaj la jarfinan bilancon de la C.O. en Rotterdam.

Post la kongreso en Sofio, la komitato, kiel tuto, faris la sekvantajn skribajn decidojn:

1. akcepton de la spezkonto pri la 47-a U.K. en Kopenhago,
2. komfirmon de la nomigo de s-ro I. Krestanov kiel anon de la Internacia Ekzamena Komitato en Sofio,
3. nomigon de s-ron Krestanov en tiu Komitato por la estonteco.

Dum la 49-a U.K. en Hago s-ino Kervers kaj s-ro Woessink ĉestis ĉiujn kun-

sidojn de la komitato. La tagordo enhavis 21 punktojn kaj oni aldonis ankoraŭ 3. Ni ne traktos ĉiujn punktojn ĉi tie. L.E.E.N.-anoj, kiuj havas multan intereseon en la laboro de la komitato, certe ĉestis la kunsidojn. Ni nur prilumigu kelkajn punktojn. Kiam komitatanoj Ĉ estis elektitaj, ekestis vigla diskuto pri la propono, ke oni elektu ankaŭ Pastron Beckers. S-ino Kervers atentigis pri la fakto, ke en itala kaj belga gazeto aperis resumoj el letero, kiun la Pastro sendis al la Episkoparo kaj en tiuj artikoloj la t.n. neŭtrala organizaĵo ne estis bone juĝita. S-ino Kervers ne povis imagi, ke persono kiu skribas tiajn artikolojn, bone povus labori por U.E.A. La proponintoj havis la impreson, ke oni ne bone tradukis la leteron el la latina lingvo, en kiu ĝi estis verkita. Ili prenis sur sin la taskon esplori la aferon kaj oni prokrastis la decidon pri Pastro Beckers.

La elekto de la estraro por la sekvantaj tri jaroj estis malfacila afero. Fine oni trovis jenan solvon: prezidanto prof. d-ro I. Lapenna (Britujo), vic-prezidantoj s-ro E. L. M. Wensing (Ned.) kaj s-ro E. Carlsen (Svedujo), ĝenerala sekretario s-ro G. Becker (Germ.), estraranoj: d-ro Albault (Francujo), s-ro Toczysky (Polujo), s-ro E. M. Jaumotte (Belg.) kaj s-ro E. J. Woessink (Ned.) kaj s-ro Tonkin (Usono) kiel reprezentanto de T.E.J.O. ĉe la estraro.

ASOCIAJ INFORMOJ.

La Jarkunveno de L.E.E.N. okazos dimanĉon, la 2-an de majo, en Amersfoort, en Restoracio „De Oude Tram”, tuj apud la stacidomo.

Komenciĝo precize je la 11-a h.

EL LA SEKCIOJ.

Sekcio Almelo.

Sekr.: De Sav. Lohmanstraat 30.

Loka gazeto enpresigis la antaŭajn semajnojn la Esperanto-kurson de s-ro H. Kervers. Kvankam estis nur 18 kursistoj, nia sekcio tamen povis noti el ili kelkajn novajn anojn.

Ni kompreneble esperas, ke post ĉi tiu skriba kurso sekvos parola kurso.

Por gekursanoj, membroj kaj aliuloj ni

La komitato esprimis sian dankon al s-ro Holmes, kiu diversfoje estis aganta prezidanto de U.E.A. S-ro Holmes tri fojojn prezidis Un. Kongresojn, li ĉiam gvidis la kunsidojn saĝe kaj lerte. Li donis al ĉiu la saman atenton, aŭskultis ĉiun pacience kaj trankvile. Li ofte per spriteco traboris muron de miskompreno, neniam trudis sian volon al iu ajn. Lia sinteno donis dignon al la komitato. Sep komitatanoj (inter ili s-ino Kervers kaj s-ro Woessink) proponis ke la komitato elektu sinjoron Holmes Honora Prezidanto de U.E.A. La komitato unuanime akceptis la proponon.

Speciale interesaj estis la raportoj de la komisionoj pri la lernejoj kaj pri la Jaro de Internacia Kunlaboro (JIK). Pri JIK vi certe jam multon legis kaj ni opinias, ke vi laboras por ĝi.

S-ino Kervers estis denove elektita kiel kontrolanto por la jaro 1964-a.

Ni ambaŭ forte apelacias al la membroj de L.E.E.N., ke ili pli kaj pli interesiĝu pri la mondskalaj aferoj kaj ke ili kunlaboru per siaj fortoj en la diversaj agadoj de U.E.A. Komitatanoj de U.E.A. estas nur ordinaraj homoj, kiuj bezonas ĉies helpon, por ke realiĝu la laboroj farindaj kaj farendaj. Eble nun estas la tempo antaŭenpuŝi la aferon de la Internacia Lingvo.

Ekagu kun ni! La laboro atendas nin ĉiujn.

Hago: E. Kervers-van Tholen.
Arnhem: E. J. Woessink.

organizis en marto Esperanto-vesperon.

F. B. R.

Sekcio Zaandam.

Sekr.: P. L. Takstraat 64.

Ekestis la plano por partopreni la estontan jubilean kongreson en Amersfoort kiel eble plej multnombre. Tial ni petas nian anaron atente legi la oficialan informon en „Nederlanda Esperantisto” de marto sur paĝo 25-a. Membroj posedantaj aŭton estas petataj informi la estraron pri eventuala intenco viziti la jubilean kongreson kaj kiom da lokoj ili havas liberaj, por ke ni klopodu organizi aŭto-karavanon. Ankoraŭ estas sufiĉe da tempo, ĉar temas pri vendredo, sabato kaj dimanĉo respektive la 24-a, 25-a kaj 26-a de septembro estonta.

Sekcio Haarlem.

Sekr.: Ruys de Perezlaan 2, Aerdenhout.

La 4-an de februaro la sekcio organizis sian jarkunvenon. Oni pritraktis la kutimajn punktojn de la tagordo. El la jarraporto ni citas, ke okazis ĝemeliĝo kun tri elksterlandaj kluboj, nome: Angers en Francujo, Bridlington en Anglujo kaj Fredericia en Danujo.

La gazetarservo komunikis pri la diversaj sciigoj en la gazetoj. „Haarlems Dagblad” aperigis 8 artikolojn pri Esperanto. S-ro Janssen estis reelektita kiel prezidanto.

Dankesprimoj.

Estimataj gesamideanoj,

Ĉar ne estas eble al mi danki persone ĉiujn gesamideanojn pro la kunvivo dum mia grava malsano, mi dankas ĉiujn laŭ ĉi tiu maniero.

Mi ricevis multajn florojn, fruktojn, leterojn k.t.p.

Krome diversaj gesamideanoj vizitis min. Okazis dum tiu tempo ankaŭ amuzaj aferoj. Ekzemple s-ro Hendriks, Leeuwarden, sciis, ke mi estas grave malsana; li skribis tion al fam. Bartoŝik-Woudstra en Praha, kaj post proksimume 14 tagoj, mi ricevis de fam. Bartoŝik belan poŝtkarton, per kiu ili deziris al mi baldaŭan resaniĝon.

Feliĉe mi nun estas hejme kaj sentas min sufiĉe bone, kvankam ankoraŭ daŭros longe, antaŭ ol mi rajtos denove labori. Tre volonte mi atendos viziton de gesamideanoj.

M. Koopmans, Fak-Delegito U.E.A.,
Groningen, Verlengde Oosterweg 26.

Rezervu la 24-an ĝis la 26-a de septembro 1965 por Nia Jubilea Kongreso.

VIDU LA PROGRAMON EN LA MARTA NUMERO
KAJ LA ALIĜILON EN ĈI TIU NUMERO.

Bonvolu ensendi vian aliĝilon kiel eble plej baldaŭ.

La Komitato.

21a INTERNACIA JUNULARA KONGRESO DE T.E.J.O.

Korespondadreso: (valida ankaŭ por la kasisto) 21-a IJK, Kansaj Esperanto-Renmei, 3-10, Nakatu-Hamadori Ooydo-ku, Osaka, Japanujo.

Telegramadreso: ESPCENTRO OSAKA.

8—15 de aŭgusto 1965.

Kongreslokoj: La japana centro de Junulargastejoj, en Ootu, Gubernio Siga, por loĝado kaj ĉefaj kunvenoj; kaj Kioto por ekskursoj.

Kotizoj post 1 IV.1965

malpli ol 20-jara	20 US dolaroj
pli ol 20-jara	22 US dolaroj
nemembroj de TEJO	24 US dolaroj

La kotizo inkluzivas veturkostojn de aŭtobusoj inter loĝejo kaj diversaj kunvenoj, tiujn por la ekskursoj, loĝado kaj manĝado.

Aliĝo kaj pago: Aliĝilon oni sendu al la koresponda adreso kaj la kotizon ankaŭ al la sama adreso per poŝtmandato.

Limdatoj:

15 junio 1965: ĝis tiu dato aliĝoj estas nuligeblaj, kondiĉe ke la nuliganto rericivos sian kotizon minus 3 US dolaroj pro jam faritaj elspezoj.

1 julio 1965: lasta dato por aliĝo.

Alvojaĝo: Iro-revena veturado inter Tokio kaj Kioto per nova ultra-ekspresa vagonaro kostas 14 US dolarojn kaj estas aparte pagenda.

Gravas, ke vi sendu viajn komunikajojn per aerpoŝto, por ke ili bonorde kaj ne prokrastite alvenos al la aranĝanto.

Atenton pri la altigo de la aliĝkotizo: ĝis 1 aprilo 1965

63 ned. gld. por junuloj malpli ol 20-jaraj;
70 ned. gld. por junuloj pli ol 20-jaraj.
(Validas la dato de la poŝtoŝeja stampoj).

FONDO DE NEDERLANDA SEKCIO DE TEJO

Dum tuttaga kunveno je la 9-a januaro per komuna interkonsento estis fondata Nederlanda Esperantista Junularo. La celoj de NEJ estas:

1. Organizati ĉiujn gejunulojn-esperantistojn en Nederlando.
2. Instigi la fondon kaj stimuli la agadon de lokaj grupoj.
3. Okazigi 4 tuttagajn kunvenojn ĉiujare.

Post amika interparolado kun s-ro H. Bakker, komitatano de Tutmonda Esperantista Junulara Organizo (TEJO), NEJ iĝis landa sekcio de TEJO. S-ro Bakker prizorgos kiel antaŭe la informan fakon (adreso: Kastelenstraat 231, Amsterdam). Ĉiu juna esperantisto ĝis la aĝo de 30 jaroj povas esti membro. La estraro estas perletere elektata. Kiel provizora sekretario funkcias s-ro R. Groeneveld, Makassarstraat 112 III, Amsterdam-O. Li petas ĉiujn legantojn de „N.E.” sendi al li adresojn de junaj esperantistoj.

Oni povas ricevi informojn ankaŭ ĉe Nederlanda Esperantista Junularo, p/a s-ro Aŝvinikumar', Kr. 44, Westermarkt 16, Amsterdam 2. Tel. 0 20 - 6 67 29. S-ro Aŝvinikumar' funkcias kiel provizora prezidanto.

La jara kotizo estas gld. 5,—. Oni povas pagi al poŝtĉekkonto 1 35 00 t.n.v. Gemeente Giro Amsterdam, t.g.v. rek. nr. E 411 t.n.v. Esperanto-Rondo, p/a P. D. H. Broers, Loosduinstraat 20 I, Amsterdam 17. Ĉi tiun konton oni provizore uzas. Baldaŭ oni ekhavas propran konton.

50-A UNIVERSALA KONGRESO DE ESPERANTO.

Tokio, 31.VII—7.VIII 1965.

OFICIALA KOMUNIKO.

Teatra Prezento: Dum la Universala Kongreso okazos teatra prezento fare de la „Teatro Populara” el Lodz (Pollando).

Prezentata estos la konata dramo de la usona verkisto Shimon Vincelberg „Kakti signifas malamikon”.

Foto-Konkurso: Ni atentigas la interesigantojn, ke la juĝkomisiono akceptos konkursajn ĝis la 1-a de julio 1965. Por eviti altajn kostojn pro aerpoŝta sendo, estas konsilinde sendi la fotojn por la Konkurso per surfaca poŝto, kalkulante, ke en tiu kazo necesas 40 ĝis 60 tagoj. Ni samtempe memorigas pri la riĉaj premioj je dispo de la gajnintoj, kiuj konsistas el 210,— ned. gld. plus 1 fotoaparato kaj 3 projekciiloj por lumbildoj. La fotoaparato kaj la projekciiloj estas afable disponigitaj de la konata japana fabriko FUJI.

Detaloj pri la Konkurso troviĝas en la Dua Bulteno kaj en la novembra eldono (1964) de la revuo „Esperanto”.

Kotizoj: Post la 31-a de marto la aliĝkotiĝoj estos la jenaj:

Kongresano	60,— ned. gld. (240 st.)
Edz(in)o de kongr.	30,— ned. gld. (120 st.)
Junulo malpli ol 20-jara	23,— ned. gld. (92 st.)
Univ. Studento de 20-30 jaroj	37,— ned. gld. (148 st.)
Blindulo	30,— ned. gld. (120 st.)

G. G. Pompilio,

Konstanta Kongresa Sekretario.

INTERNACIAJ FERIAJ KURSOJ.

18/7—25/7 1965.

Helsingör-Danlando.

Aranĝo pli ol 30-jara, kiu ludas gravan rolon en nia movado per lingva lertigo de multaj miloj da samideanoj el preskaŭ ĉiuj partoj de la mondo, sed ĉefe el eŭropaj landoj.

Petu prospekton ĉe la organizanto, s-ro L. Friis. Vidu la anoncon sur paĝo. 39.

EUROPA ESPERANTO-KONFERENCO 1965 - WIEN

11—7 ĝis 17—7—1965.

Nia komuna vojaĝo: Kvankam la nombro de la ĝisnunaj anoncintoj malsuperas la atendojn, estas tamen certe, ke nia komuna vojaĝo efektive okazos. Aliĝo de pliaj partoprenantoj do havos la agrablan rezulton, ke la profito per la komuna vojaĝo por ĉiu unuopa persono fariĝos pli granda. Por detaloj pri la projekto de la komuna vojaĝo vidu la numerojn decembro 1964 kaj januaro 1965 de „Nederlanda Esperantisto”.

La varba sonbendo de EEK estas prunteprenebla ĉe J. Th. de Goeij, Deensestraat 58c, Rotterdam 7. Petu ĝian sendon kaj aŭdigu ĝin en unu el viaj societaj kunvenoj.

Pri la Konferenco: Pli kaj pli evidentiĝas, ke EEK estas survoje fariĝi grava manifestacio por Esperanto. Multaj diversaciaj esperantistoj petis informojn pri aŭ anoncis sin por partopreno al la Konferenco.

Ke la aŭtoritatuloj en Aŭstrujo konsideras la Konferencon tre serioza kaj grava montriĝas el la fakto, ke la Ĉefministro de Aŭstrujo: D-ro J. Klaus, fariĝis la Alta Protektanto de la Konferenco. Multaj aliaj altranguloj: ministroj, parlamentaj prezidantoj, ekleziaj eminentuloj, universitataj rektoroj kaj aliaj gravuloj aliĝis al la Honora Komitato.

Ke ankaŭ en la Esperanto-socio oni taksas EEK-n tre grava, fariĝas klare, kiam oni vidas la liston de la prelegoj, kiuj okazos dum la Konferenco:

La Prezidanto de UEA, Prof. Ivo Lapenna, pri: Lingvaj problemoj en la internacia politiko;

La Vicprezidanto de UEA, S-ro E. L. M. Wensing, pri: La evidenta praktika valoro de Esperanto en internaciaj ekonomiaj rilatoj;

La Direktoro de Internacia Esperanto-Muzeo Wien, Kortega Konsilisto H. Steiner, pri: Esperanto en la literaturo;

La Komitatano de Aŭstria Esperanto-Instituto, S-ro E. Werner, pri: Esperanto kaj la turismo.

Cetere okazos fakkunvenoj de:

I.S.A.E. - I.L.E.F. - E.S.L.I. - Eŭrop-federalistoj - Arĥitektoj - I.A.E.L.

Aliaj eroj de la programo: du tuttagaj ekskursoj, unu aŭtobusa kaj unu ŝipa; foto-konkurso; internacia balo; ekskursoj en la urbo kaj ĝiaj trezorejoj; filmprezentadoj; distra vespero, pianokonzerto, farota de la londona esperantisto F. Merrick.

Post la ĝuado de multaj el la antaŭe menciitaj sendube brilaj kaj gravaj, eventoj vi havos la eblecon partopreni allogan tutsemajnan ekskurson per aŭtobusoj en Aŭstrujo, kies vojo estos: Vieno - Graz - Klagenfurt - Wörthersee - Grosz Glockner - Salzburg - Linz - Vieno.

Se vi ne povos partopreni la Universalan Kongreson en Tokio, ĉu necesas ankoraŭ instigi al tuja aliĝo al ĉi tiu Esperanto-manifestacio, multpromesa ĉiurilate? - Vi certe vivos dum unu aŭ du semajnoj en VERA ESPERANTUJO!

ATENTU: Kontraŭ unu internacia respondkuponon ĉiu esperantisto ricevos belan ilustritan relief-mapon pri Malsupra Aŭstrujo kun du aliaj Esperantaj fremd-ultrafikaj varbiloj. Mendebla ĉe: Eŭropa Esperanto-Konferenco 1965, p/a Aŭstria Esperantista Federacio, Fünfhausgasse 16, Wien XV, Aŭstrujo.

La Unuan Bultenon kun aliĝilo por la EEK oni povas peti ĉe: Centra Oficejo de UEA, Nieuwe Binnenweg 176, Rotterdam 2, aŭ ĉe: J. Th. de Goeij, Deensestraat 58c, Rotterdam 7.

J. Th. de Goeij.

57-A FRANCA KONGRESO DE ESP.

Le Havre 5/6/7 junio 1965.

Aliĝo por eksterlandanoj estas senpaga. Skribu al s-ro Mammaux 33, Rue Saint-Michel, LE HAVRE, (Seine-Maritime), Francujo.

Apudmara Esperantista Semajno en Balarue (Sudo de Francio).

La semajno okazos de la 12-a ĝis la 19-a de julio 1965-a. Nur por tendumantoj. Informos vin: Lentaigne, 3 av. Gaillarde, MONTPELLIER, Francio. (B. v. aldoni respondkuponon).

Manuskriptojn por „N.E.” ni akceptas ĝis la 10-a de la antaŭa monato. Post tiu dato ni ne plu povas akcepti ion.

Redaktoro.

NI BEZONAS . . . MILIONON, EĈ PLII!

Karaj legantoj! Ni bezonas milionon! Kaj eĉ pli!!!

Ne pensu, ke temas pri miliono da anoj de L.E.E.N. . . . aŭ almenaŭ de U.E.A. Ankaŭ ne temas pri miliono da guldenoj por elspezi propagandcele.

Ankaŭ ne temas pri miliono da homoj, por ĉirkaŭbraki (laŭ Schiller).

Tamen, jes tamen, pri miliono da homoj . . . kaj eĉ pli, por peti la nomon kiel subskribon por nia petskribo al Unuiĝintaj Nacioj.

Tiun milionon ni povas, ja devas kolekti, ne sole en Nederlando, sed internacie. Ni, L.E.E.N.-anoj, donu nian kontribuon en tiu kolekto. Kaj fortan kontribuon, ĉar ĝis nun la kolekto tute ne estas laŭ la nuna stato kontentiga. Kontraŭe al la supozoj ĝi estas nun tia, ke nia prezidanto de U.E.A. malesperas.

Ni ne seniluziĝu lin. Ĉiu el ni laboru per la folioj de la petskribo. Ĉiu en sia propra medio varbu subskribojn almenaŭ tiom, ke li plenu ĝin per 20 nomoj. En la Asocia Jarraporto ni povas lagi, ke L.E.E.N. havas 871 membrojn. Ni do povas kolekti 17420 subskribojn.

Sciu, ke kelkaj el niaj membroj jam kolektis centojn.

Sciu, ke unu sola homo, s-ro H. Müller el Germanujo, jam kolektis 1500 subskribojn. Sciu tamen, ke laŭ la nuna stato nur iom pli ol 30.000 subskriboj estas senditaj al la C.O. en Rotterdam.

Ĉu vi kolektis viajn subskribojn por montri al varbontoj, kiel plia instigilo? Bone! Sed ne tro longe atendu sendi ilin al Rotterdam, ĉar tie ĉio devas esti registrita kaj tio postulas tempon. En oktobro ĉio devas esti preta.

Ankaŭ ne atendu tro longe varbi ĉe via konatoj kaj nekonatoj. Ne atendu ĝis la lasta minuto.

Profesoro Lapenna venkis en Montevideo en la lastaj tri minutoj. Tiu venko estis decida por la irado de nia movado. Poste la mondo vidos, ke tiu momento apartenas al la „Sternstunden der Menschheit”. Ne pensu, ke ni povos fari la saman. Ke ankaŭ ni povos venki en la lastaj tri minutoj.

En la kadro de la Jaro de la Internacia Kunlaboro ni agu nun, tuj, por havi en oktobro ankaŭ viajn amase kolektitajn subskribojn!

R. S.

TRA LA LIBRARO.

SANDOR SZATHMARI, „*MAŝIN-MONDO*” kaj aliaj noveloj. *Enkonduko de William Auld. Kovrilo kaj vinjetoj de Zoltán Illéssy. Eldonis STAFETO J. Ré-gulo, La Laguna, Kanariaj Insuloj. Formato 12½ x 18½ cm., 188 paĝoj. Prezo broŝ. f 5,40; mendebila ĉe Libro-Servo L.E.E.N., Leeuwarden.*

Sándor Szathmári estas hungara verkisto, kiu pliparte verkis en Esperanto, kaj jam estas konata al ni per sia romano *Vojaĝo al Kazohinio*. Li estas satiristo kaj ŝate okupas sin sur estonta tereno; li estas admiranto i.a. de Madách kaj Wells, kiu lasta evidente inspiris lin al verkado de sia *Maŝinmondo*. Krom tiu ĉi novelo la libro enhavas ankoraŭ tri aliajn.

Maŝinmondo la titolo ne lasas nin en dubo, pri kio temas tiu ĉi novelo. Ni jam vivas en mondo, en kiu la maŝino regas kaj faras homajn fortojn aŭ nur aŭtomata agado aŭ tute superfluaĵ. Szathmári utiligas tiun ĉi fakton por verki satiron pri la bildo de nia estonteco, en kiu la konstante perfektigantaj teknikaj progresoj kondukas al absurda socia stato: la maŝinoj superregas kaj la homaj cerboj jam ne kapablas savi sin el la nenormalaj situacioj, kreitaj de iliaj scienc-, espior-, juĝ-, plan-, gvid- kaj aliaj pensmaŝinoj. La maŝinoj vivas por si mem; ne la homoj regas la maŝinojn, sed la maŝinoj regas la homojn.

Plej trafa estas miaopinio la satira priskribo pri la antagonismo reganta inter la du mondfortoj, la ŝtatoj Bravio kaj Heronio. Ambaŭ ŝtatoj elpensas la plej celtrafajn militmaŝinojn por „defendi” sin kontraŭ la „malamikoj” kaj sendangerigi ties similajn maŝinojn. La rezultato de tiu ĉi agado estas reciproka neniigo kaj plena ekstermo de ĉiu homa vivo. En la nuna tempo la homaro jam estas plurjare survoje al tia sensenca, katastrofa, krima kaj amasa sinmortigado. Ne estas mirige, ke la multego da homoj kun evidente sana cerbo streĉas siajn fortojn por alproksimigi tiun fatalan ekstermadon.

La dua novelo, „*Supermilaj noktoj*”, estas rakonto pri homo, kiu malgraŭ ĉia mizero tamen sentas sin feliĉa. Ĝi estas verkita en la kadro de rakontoj el „*Mil kaj unu noktoj*”. La tria novelo, „*Dokumentoj pri la historio de la kampofono*”, temas pri fantazie sublimaj kaj kompliki-

taj teknikaj progresoj fine kondukantaj al detruo de . . . muziko.

„*Vincenzo*” estas la titolo de la kvara novelo, tradukita de Kalocsay el la hungara lingvo. Kvankam ne tute en la kadro de la antaŭaj noveloj, tiu ĉi satiro estas speciale rimarkinda. Ĝi estas fantazia pritrakto pri la fama historio de Galileo kaj reliefigas la tiutempan vanan batalon por sciencaj faktoj kontraŭ la ekleziaj dogmoj kaj tradicioj. Kvankam en formo multe mildigita, tiu antagonismo ankoraŭ nun ekzistas.

La mondbildo, kiun Szathmári prezentas, ŝajnas pesimista. Tamen, per siaj satiraj skizoj li pruviĝas pli ĝuste realisto, ĉar li klare travidas, ke ĉio nova, elpensita por plibonigi la mondon, finfine tamen ne havas la sopiritan rezultaton. Ĉio tio estas nur unu paŝo al plibonigo de la mondo, sed ofte naskas pli da senniluziigoj ol da ĝojoj, ĉar la gvidantaj figuroj en nia socia ordo pli aspiras kontentigi siajn ambiciojn ol servi la bonstaton de la homaro.

La stilo, kiom permesas la ofte teknikaj malfacilaj temoj, estas sufiĉe glata. El gramatika vidpunkto la teksto montras kelke da eraroj aŭ kritikindaĵoj, ekz.: *evoluigi*(22, 87, 110), la plej strange (36), *kuracotuloj*, *konatuloj* k.s. (35, 48, 49, 51, 58, 60, 70), restas nenio alia ol (krom) atendi (45), *kion* rezultas (44), ferojoj malplene kuradis (66), *tiu* (tio) (87). Stranga aspektas futbalkilko (86); alportontis (79), onskribajo kaj similaj kunmetaĵoj kun *ont* rezultas el la speciala „onta” temo. Kelkfoja uzo de *tion* antaŭ objekta propozicio: oni ne scios plu eĉ *tion*, ke Kepler . . . (172) estas evidente hungarismo. Nekutimaj aŭ strangaj estas *nure* (161), *nul* vorto (161, 162), *unun* (142). Komposteraroj estas repondi (51), esta (141), *hodiaŭaj* (159), ali li (al ili) (26), *monumentun* (m) (186). Superfluaĵ neologismoj troviĝas precipe en „*Vincenzo*”.

G. J. D.

„*IDETOJ*” kaj: „*KION VI FARAS*”. *Du novaj eldonoj en la serio „Legu kaj Lernu” (vidu „N.E.” de marto, pĝ. 27). Prezoj resp. 3 steloj kaj 4 steloj afrank. Eld. de s-ro D. P. Faux, Valley Farm House, Charndon, nr. BICESTER, Oxon, Anglujo.*

Varia lego- kaj lernomaterialo por la junaj esperantistoj.

Rekomendita materialo.

SEKVINDA EKZEMPLO

Nia ano J. Th. de Goeij en Rotterdam sendis al ĉiuj siaj korespondantoj formularon por la subskribo-kolektado per la propono al Unuiĝintaj Nacioj. Al la formularo li aldonis stencilitan tekston por siaj korespondantoj. Tiu teksto estas jena:

„**Kara amik(in)o,**

Mi tre afable, sed insiste, petas vin vigle partopreni la kolektadon de subskriboj por Esperanto!

Post via subskribo vi povos subskribigi: viajn familianojn, parencojn, amikojn, konatojn, najbarojn, kolegojn.

Ĉe viaj kluboj aŭ landaj asocioj (institutoj) vi povos ricevi pliajn formularojn, ofte eĉ kun la traduko de la propono en la propra lingvo.

DEVAS esti eble, kolekti unu ĝis du milionoj da INDIVIDUAI subskriboj, se ni ĉiuj en la tuta mondo agos fervore kaj komune!

Dum la kolektado vi spertos, ke ekzistas homoj, kiuj rifuzas subskribi. Kial? Tion ili mem plejofte ne povas klarigi bone. Sed vi spertos ankaŭ, ke ekzistas multe da homoj, kiuj estas favoraj al Esperanto, tamen oni ne postulu, ke ili mem lernu ĝin, ĉar por tio ili „ne havas tempon”.

Ĉi tiu agado por la propono al Unuiĝintaj Nacioj NEPRE DEVAS SUKCESI! GRAVE: La plenigitaj subskribo-formularoj devas atingi la C.O.-on de U.E.A. en la fino de septembro 1965. Tamen ne konservu la plenskribitajn formularojn ĝis la lasta momento, ĉar tio donus en la C.O., kie oni devas fari statistikon pri la rezulto, troan lastmomentan laboron.

Via amik(in)o,

S-ro De Goeij disponigas kvanton da stencilitaj tekstoj por tiuj, kiuj deziras sekvi lian ekzemplon. Oni petu la alsendon de la stencilajoj kun la subskribo-formularoj — kiujn oni povos perpoŝte sendi kiel presajon — ĉe li. Adreso: Deensestraat 58c, Rotterdam-7.

BESTKALENDARO 1965.

TIERKALENDER 1965. Eld. Reinsteg-Verlag, 7261 Gechingen u. CALW, Germanujo. Prezo DM 4,—.

Grandformata (41,5 x 30 cm.) dulingva -germana-Esperanto-kalendaro kun kolorbildoj de bestoj. El la kovrila teksto mi citas: „Tiu ĉi kalendaro aperas ĉiujare kun novaj bildoj kaj priskriboj el la besta mondo. La bildaro pri la multaj specoj de bestoj kaj birdoj kompletigas do pli kaj pli en la daŭro de la jaroj kaj konsistigas valoran kolektaĵon”.

Por bestamantoj tre rekomendinda kalendaro kun instruaj priskriboj sur la dorsflanko de la bildoj.

H. G.

POŝTSTAMPA KATALOGO. Eld. de Esperantaĵojn Kolektanta Internacia Klubo (EKIK), fondita en 1953, p/a Ivar Paulsson, Algatan 3, SOLNA 2, Svedujo. Stencilita. Prezo: 10 respondkuponoj.

Klare presita kaj ordigita katalogo. Tre valora por ĉiuj kolektantoj de Esperantaĵoj. Ni bedaŭras, ke la prezo estas nur indikita en rkp, tre multekosta pagilo! Kial ne indiki la prezon en guldenoj kaj sciigi poŝtgirkontan numeron?

Helsingör

La 18.-25. de julio okazos la internaciaj feriaj Esp.-kursoj (perfektiga -konversacia - kaj prepara kurso por naturmetodaj instruantoj) en la internacia

Aitlernejo en Helsingör

(Danlando), belega loko kun parko kaj ĉe banstrando. Ĉiuj kore bonvenaj. Senpaga prospekto havebla ĉe

L. Friis, Ingemannsvej 9, Aabyhøj, Danlando.

MENDU VIAJN LIBROJN ĈE NIA LIBROSERVO!

Adreso: Libro-Servo L.E.E.N., Borniastraat 95, Leeuwarden. Poŝtkonto 76915.

Ned. Esperantisten-Ver. „La Estonto Estas Nia”

Pres.: S-ro H. M. Schippers, Van Humboldtstraat 60, Utrecht.

Sekr.: S-ino W. P. Lok-van Putten, Brederodelaan 36, Santpoort (Z.).

Tel.: 0 25 60 - 76 15.

Kasistino: F-ino P. Oosthoek, Bree 49 a, Rotterdam-25.

Poŝtĝirkonto: 3 45 63 je la nomo de la unuigo.

AANMELDINGSFORMULIER

(Duidelijk invullen, liefst met drukletters)

Inzenden 6 weken vóór het examen, als brief aan de secretaresse-penningmeester:

H. M. MULDER
Zilvermeuwstraat 29, Badhoevedorp
Telefoon 0 29 68 - 24 05

De examens voor diploma E, M en S vinden plaats te Amersfoort, zaterdag 5 juni 1965.

DE KOSTEN VOOR DEELNEMING ZIJN: Voor examens E f 12,—, voor examens M f 16,—, voor examens S f 20,—

Voor hen, die lid zijn van een der organiserende verenigingen of van NoSoBE respectievelijk f 7,50, f 10,— en f 12,50; voor werkloze leden de helft; kinderen (tot 18 jaar) van leden betalen eveneens de helft. Kandidaten, die de eerste keer niet slagen, kunnen binnen 1 jaar deelnemen aan een volgend examen, waarbij vrijstelling wordt verkregen voor vakken, waarin minstens een 8 is behaald.

Aanmelding voor het examen E / M / S,

(doorhalen wat niet verlangd wordt)

waarvoor hij/zij het verschuldigde bedrag per postgiro no. 20 61 52 heeft overgemaakt.

1. Naam:
 2. Voornamen:
 3. Adres:
 4. Te:
 5. Beroep:
 6. Datum en jaar van geboorte:
 7. Plaats van geboorte:
 8. Lid van de landelijke Esp.-ver.:
- Bestudeerde literatuur (alleen voor M- en S-kandidaten):

KONCIZE

Graĵnoj en Vento.

GEV estas internacia gazeto por infanoj, kreita de infanoj mem. En ĝi infanoj raktentas al infanoj en aliaj landoj pri sia ĉiutaga vivo, pri la lando kaj la landaj kutimoj. GEV povas do esti grava helpilo i.a. ĉe la geografia instruado. Instruistoj petu informojn pri ĉi tiu laboro, jam funkcia ekde 1956, ĉe la iniciatinto: s-ro Marcel Erbetta, rue des Pins 66, 2500 BIENNE-BIEL 7, Svislando.

Kiu tradukis „Les Misérables” de V. Hugo en Esperanton?

En „Nederlanda Esperantisto” de oktobro 1964 ni transprenis informpeton el

„The Australian Esperantist” pri la tradukinto de „Les Misérables” de Victor Hugo. S-ino A. M. Slot-van der Meulen, Zeist, atentigis nin pri mencio en la Esperanto-Enciklopedio ĉe Nutters, Wiebe: „Nederlandano, tipografiisto, poste ĵurnalisto. Naskiĝis 24 aŭg. 1872 en Leeuwarden, mortis 6 dec. 1926. Kvankam simpla laboristo, li havigis al si multajn sciojn, lernis fremdajn lingvojn, trad. i.a. verkojn de Victor Hugo en la nederlandan lingvon . . .”.

Tre verŝajne do Nutters mem verkis la tradukon, kiun li eldonis en 1914 por „La Internacia Revuo”, kies redaktoro li estis de 1912-1914 (laŭ Esp.-Encikl.).

Ni kore dankas s-inon Slot pro ŝia informo.

H. G.

